


espero katolika

rm



monata revuo
fondita en jaro
1903
oficiala organo
de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA
UNUIĜO ESPERANTISTA

internacia katolika unuiĝo esperantista

fondita en 1910
honora prezidanto:
pastro A. Beckers

Centra Oficejo
CH-9106 Zürchersmühle - Urnäsch
Svislando

Oficiala Revuo
Espero Katolika
(Fondita en 1903)

Redaktoro:
P. Felice Ruaro
37010 Costermano (Vr)
Italujo

Abonkotizo
sFr. 14,=

PASKO



*La famo kuris fulme tra l' popolo:
— Alvenas Reĝo glora kaj arkana,
la Reĝo de la paco, de l' konsolo;
al la altega Diofil' hosana!*

*L'aklamoj ĉesis. Jen Iskarioto...
Sur kruco pendas Dia la ŝafido.
La tero tremis, nigras la Golgoto...
Li mortis. Plenumiĝis la perfido.*

*L' aero mutas dum patrino ploras
kun koro trapikita de l' funebro.
Sur monton, kiu vidis kaj doloras,
falas de l' trista nokto la tenebro.*

*Matenkrepuskas je la tago tria.
De l' monto disen flugas voĉo tuja,
l' animon konsolanta, sensacia:
«Jesuo reviviĝis, haleluja!».*

L. MINNAJA

La Redakcio de E.K. deziras al ĉiuj legantoj sanktan Paskon en la ĝojo de la reviviĝo.

Ni elektis tiun ĉi belan poemeton de Minnaja por honori la fervoran pioniron kaj poeton, kiu forpasis en januaro.

KRIST' LEVIĜIS

Krist' leviĝis, kun ni vivas. Haleluja!
De li gracojn ni derivas. Haleluja!
Ni forigu la malnovan pek-fermenton.
Nova vivo en la graco jam latentu.

Dio mortis por ni ĉiuj, en la mondo
reciproku lian amon — amrespondo.
Kristo leviĝis, kun ni vivas. Haleluja!
Lia nova viv' edifas. Haleluja!

Surkruce estis alkroĉita Amo; ĝi pendis tie por mi.
Per mia vivo mi devas nepre respondi tiun Amon.
Pro la fruktoj vi ilin ekkonos. Gepatrojn ni konas pere
de la infanoj. Ĉiuj ekkonos, ke vi estas miaj disĉiploj,
se vi amos unu la alian. Tia amo vidiĝas en la penso, vortoj
kaj en la faro. Kiel sunon ni spertas pro ĝia varmo kaj helo,
tiel la kristanon pro lia ama vorto kaj ago.

(El Evangelia Ritmo)

Noto - En la 9-a numero de EK 1973 ni raportis pri la pola ensemble «Evangelia Ritmo», kiu en Polujo kaj aliaj landoj prezentas en nova formo la malnovan kaj ĉiam novan «bonan novaĵon»: la evangelion de Jesuo. En «Katolika Sento» 1973 (n. 8) ni legas: «Memorinda evento de nia Roma grupo estis la vizito farita de la Pola kantista ensemble "Evangelia Ritmo", kiu kantis esperantajn motetojn kun akompano de gitaro dum la dimanĉaj mesoj de la 29-a de julio kaj de la 5-a de aŭgusto. La tre simpatia grupo, majstre direktata de la pola salvatoriana pastro Irek Leszlek, startinte de Vroclavo en Pollando, post turneo en Okcidenta Germanujo venis al Romo, antaŭ ol ĝi iros en Francujon kaj Hispanujon...». La tekstojn preparis P. Henriko Paruzel, nia agema peranto por Polujo, nun redaktoro de «Biblia Revuo». Ni deziras al la simpatia ensemble (pastro Irek, ikue-ano, kaj 8 fraŭlinoj en folkloraj kostumoj) fruktodonan agadon.

Justeco kaj solidareco

A - KRIZO DE SOLIDARECO

La Tria Sinodo de la Episkopoj rimarkis, ke malgraŭ akcepto de la fundamenta egaleco kaj de la persona digneco de ĉiuj homoj, la universala solidareco krizas. «La dividfortoj kaj kontraŭstaroj ŝajnas ĉiam kreski. La malnovaj antagonismoj inter nacioj kaj imperioj, inter gentoj kaj klasoj posedas nun novajn teknikajn instrumentojn por detrui: la rapida kurado al la armiloj minacas la plej grandan bonon de la homoj: la vivon; mizerigas ĉiam pli la malriĉajn homojn kaj popolojn, favorante nur la jam fortajn kaj riĉajn; generas senĉesan danĝeron de milito kaj en kazo de atomaj armiloj minacas ekstermi la tutan vivon sur la tero.

Samtempe naskiĝas novaj kontraŭstaroj disigantaj la homon de sia proksimulo. Se la influo de la nova ordo industria kaj teknika ne estas kontraŭstarata kaj superata per socia kaj politika agado, ĝi favoras la koncentriĝon de la riĉaĵoj, de la povo, de la decidkapabloj ĉe malgrandan grupon publikan aŭ privatan. La espero, kiu, en la lastaj jardekoj, disvastiĝis tra la homaro, ke pro la ekonomia progreso la malriĉuloj almenaŭ nutriĝos per la pecetoj falantaj el la manĝotablo, montriĝis vana en la landoj malmulte evoluintaj kaj en la mizeraj zonoj de la riĉaj landoj...».

B - VIKTIMOJ DE LA MALJUSTECO

La sinodaj Patroj rimarkas, ke multaj estas la viktimoj de la maljusteco, kiuj ne povas aŭdigi sian voĉon. «Al multaj elmigrintoj ofte oni fermas la pordojn pro diskriminaj motivoj, aŭ, se oni malfermas la pordon, ili estas devigataj vivi malsekure aŭ estas traktataj nehumane.

La samo okazas ankaŭ al klasoj, kiuj havas malmultan ŝancon en la socia promocio, kiel laboristoj kaj precipe terkulturistoj, kiuj reprezentas la plej grandan parton en la procedo de la evoluo. Oni devas bedaŭri precipe la kondiĉojn de multaj miloj de refuĝintoj kaj de ĉiu ajn raso aŭ popolo, kiu estas persekutata pro sia rasa deveno aŭ pro tribaj kialoj. Tiu ĉi persekuto pro tribaj motivoj kelkfoje fariĝas vera rasmortigo. En multaj landoj oni ofendas la justecon tre grave, ĉar multaj suferas per-

sekutojn pro sia religia kredo aŭ subpremanta ateisman agadon flanke de politikaj partioj aŭ reĝimoj, aŭ oni senigas ilin de la religia libereco; oni ne permesas, ke ili honoru Dion per publika kulto aŭ instruado aŭ propagando sian fidon aŭ ekzercu civilan agadon laŭ la principoj de sia religio. Estas maljustaĵoj ankaŭ la novaj kaj malnovaj formoj de subpremo, kiuj devenas de limigoj de la rajtoj individuaj ĉu en la perfortoj fare de la politika povo, ĉu en la perforto de privata reakcio. Ni konas tre bone la kazojn de torturo, precipe kontraŭ la politikaj malliberuloj, al kiuj ofte oni neas regulan proceson aŭ kiujn oni submetas al arbitraj agoj dum la juĝo. Kaj oni ne devas forgesi la militkaptitojn, kiuj eĉ post la konvencio de Ĝenevo ne estas traktataj humane.

La kontesto kontraŭ la aborto laŭleĝa, kontraŭ la trudo de kontraŭkoncipiloj kaj kontraŭ la milito estas signifoplenaj formoj de defendo de la vivo.

Krome la nuntempa konscienco postulas la veron en la komunikiloj sociaj, kio inkluzivas la rajton je objektiva bildo.

Oni devas ankaŭ substreki, ke la rajto de la infanoj kaj de la junularo je la edukado, je morale sanaj komunikiloj kaj vivmedioj nuntempe estas denove en granda danĝero.

La agado de la familioj en la socia vivo malofte estas sufiĉe agnoskata de la ŝtataj institucioj.

Ne estas forgesenda la kreskanta nombro de la personoj, kiujn la familio kaj la societo neglektas: maljunuloj, orfuloj, malsanuloj kaj multaj aliaj forlasataj homoj».



La parokestro demandas al knabeto:

— Kiom da sakramentoj havas la Eklezio?

La knabo pensas longtempe, poste li diras:

Neniun plu, ĉar vi donis la lastajn al mia onklo Julio.

* * *

S-ino Miller aŭdas bruegon en la kuirejo.

— Anna, ĉu vi rompis ion denove?

— Jes, sed ĉifoje mi havis bonan ŝancon: la glasoj ne estis lavitaj.

EL LA MONDO ESPERANTISTA

En «Aŭstria Esperanto-Revuo» oni legas la novjarsaluton, kiun la aŭstria Prezidento, s-ano d-ro Franz Jonas, direktis al la tutmonda esperantistaro per Radio-Vieno. Estas kuraĝiga la fakto, ke elstaraj aŭtoritatuloj amas kaj uzas la internacian lingvon.



Inter la programoj de AKLE (Aŭstria Katolika Ligo Esperantista):
12.3.1974 «Ekumenismo kaj internacilingva problemo» laŭ la magistra verko de s-ano G. Korytkowski.

9.4.1974 «La sankta Semajno en la kristanaro diverslanda».

23.4.1974 «La encikliko Populorum Progressio de Papo Paŭlo en Esperanto».



La aŭstriaaj esperantistoj memoras la 16-an UK, kiu okazis en Vieno antaŭ 50 jaroj kaj atingis la nombron de 3400 kongresanoj.



Lia Ekscelenca Moŝto Mons. A. Bugnini, sekretario de la Kongregacio por la Dia Kulto, skribis al nia redakcio: «Min ĝojiigas certigi vin, ke la problemo de Esperanto kiel internacia lingvo interesas tiun ĉi Kongregacion».



La universitato de Fort Lanerdale (Florida - Usono) estas ĝis nun la nura universitato en Usono kaj unu el tre malmultaj en la mondo, kiu organizas Esperanto-kursojn validajn por diplomo. Aliaj Usonaj universitatoj organizas E-kursojn, sed la studentoj ne ricevas notojn utilajn. En la universitato de Fort Lanerdale Esperanto havas la saman rajton kiel la aliaj lingvoj modernaj.

En nia revuo ni publikigis la interesan leteron de Patro A. Ciccanti, la fama «aviostopisto» aŭ «fluganta esperantisto», kiu en Norvegujo, Svedujo, Finnlando kaj Danlando faris prelegojn kun diapozitivoj pri Sankta Francisko el Asizo kaj pri kelkaj artoriĉaj italaj urboj, memkompreneble en Esperanto.

Ni gratulas tutkore la senlacan kaj ageman kapucenon, prezidanton de la itala filio de IKUE, kaj bondeziras al li fruktodonan agadon kun la espero ke lia ekzemplo stimulos nin ĉiujn.



Organizita de U.F.E. en Francujo okazis naci-skala opinio-sondo pri Esperanto. Jen la respondoj de 1.163 demanditoj.

1. Ĉu vi jam aŭdis pri Esperanto? Jes 991, ne 172.
2. Ĉu vi scias, ke ĉiujare en la mondo okazas Universala Kongreso de Esperanto? Jes 598, ne 565.
3. Ĉu vi scias, ke en Parizo oni ludas E-teatraĵojn? Jes 139, ne 1024.
4. Ĉu vi scias, ke 19 departamentaj konsilantaroj voĉdonis favore al instruado de Esperanto? Jes 157, ne 1.006.
5. Ĉu vi scias, ke Esperanto estas pli facila ol iu ajn alia lingvo? Jes 589, ne 574.
6. Laŭ vi, kiu lingvo devus esti la lingvo de E.E.K. kaj poste de Unuiĝintaj Statoj de Eŭropo?
Esperanto 475, Franca 164, Angla 222, Germana 7. Alia lingvo aŭ sen opinio 295.
7. Ĉu vi opinias, ke Esperanto devus esti elektebla lingvo en la abiturienta ekzameno? Jes 794, sen opinio 226, ne 143.

Jesuo Kristo transformos nian mizeran korpon, konformigante ĝin al sia glora korpo. (S. Paŭlo)

La volo de tiu, kiu sendis min estas tiu: ke mi nenion perdu el tio, kion li donis al mi, sed revivigu ĝin en la lasta tago. Evangelio



AVIZOJ

1. La IKUE-KELI-kongreso (20-27 VII), kiel oni jam plufoje komunikis, okazos en Hamburgo (Jugendpark Langenhorn). Ni esperas, ke la aliĝiloj senditaj al LKK de Hamburgo alvenos bonorde, malgraŭ la strikoj de la germana poŝto. Se iu ne ricevis la aliĝilon kaj deziras partopreni la kongreson, petu ĝin de nia redakcio aŭ de sia landa peranto. Ni ripetas la nomon de la kongresa kasistino: F-ino Helga Brodthage, Reichardtstr 17-II, D-2 Hamburg 50 (Altona). Kongresa poŝtkonto: Helga Brodthage, Hamburg n. 389194-209.
Temo de la kongreso: «Li la Majstro, ni la fratoj». La kongresejo estas junularhejmo en la periferio de la urbo. Tie oni povas tranokti dum UK.
2. Kiam vi skribas al la sekretario de IKUE, bonvolu meti la nomon de via lando, ne nur la nomon de via urbo.
3. Nova libro-listo de la dana E-eldonejo ĵus aperis. Ĝi estas 12-paĝa kaj ampleksas pli ol 50 titolojn, preskaŭ ĉiuj kun kliŝo-desegno. Sur paĝo 2 troviĝas la plej novaj eldonoj, i.a. 2 libroj por geknaboj kaj la klasikaĵoj de nia fama stilisto KABE, «Patroj kaj filoj» de Turgenjev kaj «La Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj» de diversaj polaj verkistoj. La librolisto estas senpage havebla ĉe Dansk Esp.-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Abyhoj, Danlando.
4. En tiu ĉi numero troviĝas la nomoj de tiuj, kiuj ĝisnun petis kopiojn de EK por orientaj IKUE-anoj.
5. Nia redakcio dankas tiujn, kiuj sendis artikolojn kaj raportojn. Ni konsilas, ke oni skribu artikolojn per skribmaŝino.



P. Felix Stricki (Jugoslavio) :

Al mi ŝajnas, ke ĉiuj niaj kongresoj devus esti komunaj kaj nia revuo ankaŭ devus ĉiam esti komuna. Unu jaron IKUE organizas kongreson kaj la sekvantan jaron KELI, kie la estraro decidis; unu monaton la katolikoj sendos la revuon al ĉiuj anoj (protestantoj kaj katolikoj) kaj dum la sekvonta monato la protestantoj sendas la revuon al ĉiuj membroj (protestantoj kaj katolikoj), sed la nomo de la revuo ne estos EK nek DR, sed KER (Kristana Esperanto-Revuo) aŭ pli simple NIA ESPERO. Mi finas mian leteron, kun la espero, ne ke ĉiuj popoloj parolos esperantlingve, sed ke la esperantista popolo kreskos.

Noto de la Redaktoro:

Malgraŭ la malfacilaĵoj, mi kredas, ke la ideoj de P.F. Stricki estas realigeblaj, ĉar tio, kio unuigas nin estas multe pli granda ol tio, kio dividas nin. En ekuмена tempo, kiam la dialogo iĝas pli kaj pli frata, bona volo de ĉiuj povas

faciligi pli grandan kaj pli fruktodonan kunlaboradon.

La temo de la komuna kongreso 1974 estas: «Li la Majstro, ni la fratoj». Jes, ni katolikoj kaj protestantoj estas fratoj kaj disĉiploj de la sama Majstro, fratoj inter ni.



J. Van Keulen, finredaktoro de «Dia Regno» (organo de KELI) :

Ŝajnas rekomendinde aperigi komunan numeron ne en decembro, sed en alia monato. Por 1974 estas bona okazo en septembro aŭ oktobro. Almenaŭ mi nun jam supozas ke oni instigos aperigi komunan postkongresan numeron. Same kiel post la kunveno en Graz.

Noto de la Redaktoro:

Sama estas mia opinio, ĉar la poŝto kelkfoje «limake laboras», precipe en la kristnaska tempo, kiam montoj da poŝto atendas forsendon. Sed ni atendas la direktivojn de ambaŭ estraroj.

Ni recensas

Aperis ĵus «La Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj de polaj aŭtoroj», eldonita de «Dansk Esperanto-Forlag». La libro entenas interesajn prozaĵojn de Sienkiewicz, la mondfama aŭtoro de «Quo vadis?», de B. Prus, mondfama aŭtoro de la historia romano «La Faraono», de Gomulicki, Niemojewski kaj aliaj famaj verkistoj.

La traduko estas de la fama stilisto KABE (=Kazimierz Bein), pola okulkuracisto, do kolego de Zamenhof. Lia lingvaĵo estas pura, klara kaj vere eleganta. Inter liaj tradukoj (Grimm-fabeloj, Turgenjev-verkoj, La Faraono de Prus) meritas grandan estimon tiuj ĉi prozaĵoj, kiujn la esperantistoj legos tre volonte kaj kun granda utilo.

Mi publikigas en tiu ĉi numero de EK la rakonton «En kvieta vespero» de Niemojewski. Temas pri la lastaj horoj de Jesuo en Betanio.

La redaktoro

En kvieta vespero

Domaĝe estis foriri de ĉi tiuj homoj puraj, simplaj kaj fidelaj, forlasi ĉi tiujn montojn, sunan polvon, virgajn bluaĵojn, bonodorajn florojn; ne vidi plu ĉi tiujn belajn tagojn kaj kvietajn vesperojn, plenajn de revoj, de noblaj pensoj kaj pasigitajn en interparoladoj antaŭ la domo de ĉi tiuj homoj.

Li deturnis la okulojn de l' suno, por momento fermetis ilin, kaj poste mallevis ilin al Mario, kiu, apoginte la kapon sur la manplato, rigardis lin kun senlima amo.

Longe li silentis, ĝis fine li malfermetis la lipojn kaj demandis: «Ĉu vi amas min?». Ŝi ekgenuis antaŭ li, almetis la vizaĝon al liaj genuoj kaj levinte siajn okulojn al liaj, respondis per larmoplena rigardo.

Li ree silentis kaj rigardis; fine li demandis:

«Vi ne forlasos min?...».

Tiam ŝi ekploris kaj metinte la okulojn sur liajn genuojn, ne povis trankviliĝi. Li daŭrigis:

«Vi ne forlasos min, kiam ĉiuj timigite forkuros?... Kiam ĉiu, tremante pro si mem, diros, ke li ne konas min?... Kiam mi restos sola kun maltrankvilo kaj doloro?...».

Ŝi ploris kaj larmis, ne povante diri vorton. Ŝi nur ĉirkaŭprenis liajn piedojn kaj kisis liajn genuojn. Li demandis:

«Vi ne forlasos min, kiam la malbenoj falos sur mian kapon, kiam la homoj indigninte disŝiros siajn vestojn, kiam ili levos ŝtonojn kontraŭ min? Kiam oni sendos

gardistojn, kaptos min, ligos kaj kondukos al la juĝo?... Ĉu vi ne forlasos min tiam?»
Ŝi levis la kapon kun teruro kaj kunmetis la manojn, paleco kovris ŝian vizaĝon. Li daŭrigis:

«Kiam oni forŝiros mian veston por min vipi?... Kiam oni kraĉos sur mian vizaĝon, nomante min mensogulo kaj blasfemulo?... Kiam mia nomo estos moko? Kiam tiuj, kiuj kredos min, riskos sian vivon?... Kiam vi vidos min malhonorita, sanganta, ĉu vi forlasos min?».

Ĝemo eliĝis el la brusto de la juna virino. Ŝiaj okuloj estis kvazaŭ senkonsciaj, la lipoj tremis.

Li ankoraŭ pli kliniĝis super ŝi kaj fine murmuretis per interrompata voĉo:

«Kiam venos la timo kaj la agonio kaj la plej malfacila momento, kiam nokte oni devos demeti, lavi, envolvi kaj entombigi min, kaj alŝovi la ŝtonon..., ĉu vi ne forlasos min tiam?...».

Mario falis al liaj piedoj kun plorego. La doloro premis ŝian koron, la pensoj implikiĝis kaj konfuziĝis. Ŝi almetis la buŝon al liaj piedoj, kaj per la mano premis la brulantan tempion, en kiu, kvazaŭ martelo, batis timo, doloro kaj malespero.

Li silentis kaj ne leviĝis, atendante respondon.

Tiam ŝi mem iom leviĝis, sed kvazaŭ senkonscia; ŝi frotis la frunton kaj rigardis per malklaraj okuloj la ĉielon kvazaŭ demandante: ĉu povas realiĝi tio, kion mi aŭdis?... Poste ŝi rigardis la montojn kvazaŭ kun demando: ĉu eble estas, ke oni faros tion al li?... Ŝi rigardis la olivajn, granatajn arbojn, la hederojn de l' domo, la belan, kvietan vesperon, fine liajn blankan veston, helan frunton kaj la veron brilantan en liaj okuloj; ŝi rigardis preskaŭ senkonscie kaj ne povis kompreni. Ŝi do sidis mutiĝinte. Ekregis longa silento. Tiam Marto aperis sur la sojlo; ŝia bruna vizaĝo ruĝiĝis, en la okuloj brilis vivo. Ŝi tenis en la mano kruĉon kaj, stante en la pordo, diris al la fratino:

«Ĉu vi ne helpos min prepari la vespermanĝon? La frato baldaŭ venos el la urbeto kaj invitos la gaston al la tablo. Kaj kiamaniere ni montros al la gasto nian sindonemon, se ni ne zorgos por kontentigi lin?».

Mario ree ekpremis la tempiojn; ŝi aŭdis nenion, ŝiaj pensoj forkuris malproksimen. La rabbi malĝoje ekridetis, rigardis Marton kaj diris:

«Ne riproĉu ŝin. Eble ŝi zorgas nun pli multe ol aliaj».

Marto aliris al la pumpilo, metis la kruĉon sur la teron kaj demandis:

«Kiel vi komprenas tion, rabbi?...»

Mario uzis la okazon por foriri kaj malaperis post la pordo de l' domo. Marto ankoraŭ ne finis la interparoladon kun la juna rabbi, kiam Mario reaperis, portante kupran vazon kaj proksimiĝinte al la rabbi, ekgenuis ĉe liaj piedoj. Ŝi estis pala. Sur la rigida vizaĝo fluis larmoj. Ŝiaj manoj tremis. Ŝi lavis la piedojn de l' rabbi kaj viŝis ilin per la bukloj de siaj haroj. Poste ŝi larmis sur ilin kaj ree viŝis per siaj longaj haroj. Fine ŝi oleis ilin per multekostaj oleoj.

La rabbi metis unu manon sur ŝian kapon kaj per la dua kovris sian vizaĝon. Marto rigardis lin kaj la fratinon, ne komprenante.

En la sama momento estingiĝis okcidente la lasta radio de belega tago.

A.Niemojewski (Tradukis KABE)



Sekvante la sintaksojn de Mimo kaj Quarello, mi parolas hodiaŭ pri la uzo de la volitivo. Donis al mi la okazon ĝusta rimarko de P. Lovro Kiŝ pri frazo, kiun oni trovas en E.K. (n. 11-12 de EK, p. 158 sub la titolo «Ni funebras»). La formo «Ni esperu, ke ili nun helpu, propetu...» ne estas korekta. «La frazo devas tiel soni: Ni esperu, ke ili helpos, propetos». Legu atente la sekvantajn 7 regulojn.

La Redaktoro

A) VOLITIVO

1. Oni uzas volitivon (u) kiel imperativon (sen «ke»):
Por rekte ordoni: Venu! Ne ridu! Demandu ion!
Por demandi, ĉu oni devas: ĉu mi portu la valizon? (=ĉu mi devas porti la valizon? ĉu vi volas, ke mi portu la valizon?).
2. Oni uzas volitivon kiel subjunktivon (kun la konjunkcio «ke»):
Post «por ke», kiu indikas celon. Li kantas, por ke vi koleru.
Post verboj esprimantaj deziron, volon, permeson, peton, admonon, zorgon, malpermeson, devigon...
La plej uzataj estas voli, ordoni, postuli, pretendi, proponi, permesi, malpermesi, admoni, averti, instigi, peti, instigi, deziri, zorgi, atendi, konsenti, konsili, necesi...
3. La verboj deci kaj gravi havas volitivon kaj indikativon:
Gravas, ke vi venku (=ke vi venkas).
4. La verboj diri kaj skribi havas volitivon, kiam tiuj ĉi verboj esprimas volon, devigon. Oni skribis al li, ke li ne venu.
5. Oni uzas volitivon ankaŭ post ĉefverbo en imperativo aŭ post ĉefverbo en indikativo, kiu esprimas volon, devigon: kiam ili estas sekvataj de «tiel, ke».
Skribu tiel, ke oni vin komprenu.
Mi volas skribi tiel, ke oni min komprenu.
Vi devas vin tiel alkroĉi, ke vi ne falu.

6. La verboj esperi kaj timi, kiam ili esprimas estontecon, postulas la futuron (os).
Mi esperas, ke vi venkos.
7. Kiam la subjekto estas la sama, oni uzas infinitivon. Mi volas iri. Vi devas skribi.
Oni uzas ofte la infinitivon, kiam la verbo de la subordigita propozicio rilatas la objekton de la ĉefverbo:
la policisto admonis la strikantojn disiri (=ke ili disiru).

B) EVITENDAJ ERAROJ

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko de la Akademio de Esperanto, en akordo kun la Prezidanto, atentigas redaktorojn de gazetoj, aŭtorojn kaj ĝenerale ĉiujn uzantojn de Esperanto pri jenaj ĉiam pli disvastiĝantaj eraroj:

A) Oni skribu ekde aŭ eke de, sed ne ek de en du vortoj, ĉar ek estas tie uzata prefikse aŭ adverbe, ne kiel interjeckio.

B) Oni ne uzu dankema, kiam ne temas pri konstanta emo al danko, sed pri momenta manifestiĝo de danko pro konkreta servo.

C) Oni ne konfuzu kompensi kun rekompenci.

Kompensi: havigi ion egalvaloran pro suferita perdo, profito aŭ farita peno.

Rekompenci: montri sian kontentecon pri ies meritoj per vortoj, faroj aŭ donacoj.

HELPANTOJ

Ni publikigas la nomojn de IKUE-anoj, kiuj petis aldone unu aŭ plurajn ekzemplerojn de EK por sendi ilin fermite al orientaj fratoj. Ilia ekzemplo stimulu aliajn peti de ni EK por tiu celo: ni sendos EK kaj adreson de orientlandanoj.

S-ro Sanson Charles (Francujo), Anton Kronshage (Germanujo), Willi Wirges (Germanujo), J. Besselaar (Nederlando), Gonzalo Arnaiz (Hispanujo), Gerard Peet (Nederlando), Vincenzo Corrias (Italujo), Johann Müller (Germanujo), Faustina Guillen-Martinez (Hispanujo), Lodovico Macak (Italio), Duilio Magnani (Italio), Klaus Perko (Aŭstrujo), P. José Claramunt (Hispanujo), Josefo Stocchiero (Italio), Galbusera Franco (Italio), P. Felice Ruaro (Italio).

TRI MATIASO

Estis malgaja nia lernejo, kie mi lernis la abocon. Nek pordon, nek fenestron ĝi havis, kiel diras la fabelo. Nature ĝi tamen havis fenestreton, sed ĝi estis nur tiel granda, ke la kapo de tiu kaprica helianto (sunfloro), kiu antaŭ ĝi supreniĝis, ne povis trairi ĝin. Des pli granda estis la pordo, sed kun tiel dikaj fendoj, ke la kato de la gesinjoroj instruistoj ĉiam tra tiu ensaltis, se la hundo Bodri volis ĝian pelton ŝiri.

Ni mem devis kunefabriki tiun benkon, en kiu ni sidis. Nature en ĝi ne estis la sido tiel komforta, kiel en la nuna, tamen ni pentradis tiel grandajn F-literojn, ke ili apenaŭ trovis lokon sur la ardeztabulo. Ni mergiĝis tiel profunde en la grandan laboron, ke ni eĉ ne aŭdis la frapanon sur la pordo kun nuraj fendoj. Nur tiam ni levis la kapon, kiam la alveninto jam staris antaŭ la s-ro instruisto. Knabo nudpieda, malfortika, pala. — Kion vi deziras, frateto? — demandis la s-ro instruisto.

— Mi ŝatus viziti la lernejon-flustris ti-meme la infano.

— Kia vento blovis vin ĉi tien, en nian vilaĝon?

— Mi havas nek patron, nek patrinon. Iu parenco samvilaĝa prenis min al si, la maljuna bakisto Banoŝ.

— Kiel vi nomiĝas?

— Tri Matiaso.

Nu eĉ en la fabelo oni povas apenaŭ tian nomon aŭdi. Ankaŭ nia s-ro instruisto ekridetis kaj surmetis sian grandan, rondan okulvitron, tiel li observis nian Tri Matiason.

— Kie mi donu lokon nun al tri homoj

en la lernejo? — ŝercis la s-ro instruisto. — Sed ĉu vi scias, kion vi faru? Prenu lokon en la angulo de la kameno! Tie estos nur bonege dum la vintro!

Nia lernejo havis grandan konusan kamenton, ties angulo fariĝis la sidejo de nia Tri Matiaso. Je Kristnasko jam estis Tri Matiaso la plej bona lernanto. Se ian demandon nek unu el ni respondi povis: — Diru nur, Tri Matiaso! — Se ni ĉiuj stumblis ĉe matematikaj taskoj: Saltu nur Tri Matiaso! — Se li skribis, ĉio estis kiel perlo; se li lecionon rakontis, kiel parkere.

Sed foje fariĝis des pli silenta Tri Matiaso, eĉ se la s-ro instruisto lin demandis. Se li rakontis la lecionon, nur balbutis tiel, ke estis turmento ĝin aŭskulti. Lia skribaĵo estis malpura, senorda tiel, ke estis malagrabla ĝin vidi. Li disĵetis la literojn tiel, ke unu kriis post la alia kvanzaŭ. Se la s-ro instruisto alvokis lin, ne saltis li, kiel la pilko, sed nur trenis sin, kiel pasero kun rompitaĵoj flugiloj. De tago al tago malgrasiĝis kiel la tranĉita pano. Foje li eĉ endormis en la lernejo, la libro falis el lia mano kaj ne vekiĝis pro la bruo. La s-ro instruisto ekŝutis liajn ŝultrojn.

Mia kara filo, kunprenu viajn aĵojn kaj iru hejmen! Kiu ekdormas apud sia libro, tiu ne serĉu ion en la lernejo.

La knabo ĵetis siajn ruĝiĝintajn okulojn sur la instruiston, sed diris nenion. Li kolektis siajn aĵojn kaj kun larmoplenaj okuloj eliris el la lernejo.

Nia s-ro instruisto postrigardis lin malgaje, poste iradis tien kaj reen sen humoro, fine prenis sian ĉapelon kaj diris:

— Mi iras al Tri Matiaso. Estu silentaj! Baldaŭ li portis la etan Matiason sur siaj brakoj kiel malsanan kolombon.

— Knaboj! Ekstaru! Honoru tiun ĉi malgrandan kamaradon vian! Tiu ĉi malforta infano de post kvar semajnoj apenaŭ fermis siajn okulojn de noktomezo ĝis mateno. De post kvar semajnoj estas malsana la maljuna bakisto Banoŝ kaj de tiu tempo Tri Matiaso bakas la panon por li. Miaj infanoj, estimu ĉi tiun mal-

grandan heroon! Kiu el vi donas al li lokon apud si?

Surplandiĝis la tuta klaso:

— Ankaŭ mi, ankaŭ mi!

En mia tuta vivo mi fieros pri tio, ke Tri Matiaso elektis lokon apud mi.

Rakonto de Mora Ferenc
Tradukis el la hungara

J. Kondor (Germanujo)

Antaŭ 55 jaroj komencis sian pedagogian laboron Katolika Universitato en Lublin. La 21-an de oktobro Universitato celebris solene ĉi-tiun datrevenon.

La Sanktan Meson inaŭguran celebris en ĉi-tiu tago Kardinalo G. Garonne. Predikis Kardinalo S. Wyszynski, primaso de Pollando. Inter partoprenantoj oni povis vidi intealie: Kardinalon K. Wojtyta (Krakow), Ĉefepiskopon A. Baraniak (Poznan) kaj aliajn anojn de pola episkoparo, pastraron, reprezentantojn de superaj lernejoj de Lublin, gastojn el Varsovio, gestudentojn de la Katolika Universitato en Lublin.

Prorektor Prof. Dr. Stefan Sawicki raportis pri la pedagogia laboro de l'Universitato kaj pri ĝia aktiveco en akademia jaro 1972-1973. Inaŭguran prelegon faris sacerdoto Dr. Stanislaw Nagy, docento de Katolika Universitato, pri «Doktrina dialogo en nuntempa eklezia movado».

Rektor de l'Universitato sacerdoto Prof. Dr. Mieczyslaw A. Krapiec konstatis, ke dank' al polaj kaj eksterlandaj fideluloj, dank' al kardinalo primaso kaj al pola episkoparo, dank' al amikoj de la Universitato, ĝi povas vivi, labori, instrui kaj eduki polan katolikan eliton. Fine de la solena ceremonio Kardinalo Garonne, prefekto de Kongregacio «Pro institutione catholica», konstatis, ke pola popolo profunde kredas en Dio, ke polaj sanktejoj estas plenaj da fideluloj. Li esprimis sian ĝojon, ke li povas partopreni en la akademio inaŭguranta novan, 1973-1974-an jaron de universitataj studoj. Kardinalo Garonne deziris al profesoroj, administraro kaj al gestudentoj prosperon kaj multajn sukcesojn.

Sac. Dr. Zbigniew Kucewicz

Du himnoj al Dio

I

*Dum nin la mond' kruela
Denove ĉiam trompas,
Nur Dio la fidela,
Neniam vorton rompas*

*Dum ni de pent' al pento
Pekpezajn korojn trenas,
El lia patra sento
Konsolo, beno venas.*

*Dum en esper' kaj timoj
La vivon ni desigas,
Li nin al bonaj rimoj
Kunforĝas kaj kunligas.*

II

*Vi estas la silento
Solena en la bruo,
La firma ŝirmtegmento
En skuo kaj detruo*

*Vi estas nokto riĉa
Post tago tre mizera,
Rikolto plej feliĉa
Post peno senespera.*

*Vi estas en aŭtuno
La vivesper' eterna,
Vi en printempa suno
La kerno plej interna.*

El la verkaro de s-ano NIKOLAO HOVORKA, Wien.

Vorka estis modela katolika samideano, verkisto, poeto, ĵurnalisto, suferinta en la tempo de la ns. subpremo en la koncentrejo Dachau, pro lia decida kristana, kontraŭ naziista sinteno.

La plej famaj medicinaj riveloj faritaj antaŭ cent jaroj

Forpasas cent jaroj kiam oni faris evidentam progreson en medicino, ebligantan disvolviĝon de malnovaj, kaj naskiĝon de novaj disciplinoj de ĉi-tiu estiminda kaj nobla scienco. La humanismo de medicinaj sciencoj kaŭzas, ke medicino kune kun aliaj sciencoj, realigas siajn celojn pere de konvena sciencaparato. Finj-ĉi celoj estas: bona farto, sano de la homo, pri kio oni devas zorgi per la prevento (preventa medicino celas malhelpi la aperon de malsano) kaj, se malsano jam aperis, per la terapio. Sciencaj riveloj potence progresigas la eksperimentajn sciencojn. Progreso devas esti evidenta. Scienco ne disvolviĝanta kaj staranta en sia elirpunkto regresas. Tio estas senduba konkludo.

Do se temas pri medicino, ĝi povas realigi sian pozitivan rolon dank'al ega disvolviĝo de ĉiuj branĉoj de ĉi-tiu scienco. Ĝi forigas suferon, savas de morto, plilongigas la vivon, antaŭmalhelpas la epidemiojn kaj endemiojn ne nur de unuopuloj sed ankaŭ de tutaj populacioj. Tamen oni devis fari multajn eksperimentojn, esplorojn, laboron, por trovi sekretojn de hodiaŭa medicino kaj malkovri ilin.

Ien antaŭ 100 jaroj:

1. Charles H. Blackley, angla kuracisto, spertis, ke ekzistas polenoj havantaj toksan influon kontakte kun ia ajn vundo, aŭ vundita haŭto. De ĉi-tiu tempo oni rivelis, ke polenoj de kelkaj herboj kaŭzas malsanon nomatan afta febro.
2. En la jaro 1873 Otto Obermayer el Germanujo, komunikis, ke li malkovris spiroketojn de rekuranta tifo.
3. Sir William Gull, kuracisto el Londono, unufoje en la historio de medicino priskribis la kretenismon de virinoj, kiu estas ŝuldata al atrofio de la tiroida glando.
4. Paul Bert, franca fiziologo, prilaboris fiziologian rudimenton de la apliko de atmosfera premo sur organismo.
5. Alexander Hughes Bennett, neŭrologo, priskribis anestezon kaŭzitan de kokaino ($C_{17}H_{21}O_4N$).
6. Camillo Golgi el Pavio malkovris novan metodon de kolorigado kaj impregno per saloj de l'arĝento de la nerva histo.
Li akiris ankaŭ meriton, esplorante hematozoon kaj plasmodion de malario.
7. Adolf Wilhelm Kolbe el Germanujo, sintezis kaj aplikis la salon de la salicilata acido, $C_6H_4(OH)COOH$, kiel antiseptaĵo.
8. Francesco Selmi el Italujo konstatis, ke dum putrado formiĝas en animalaj histoj speco de ofte tre toksaj alkaloidoj aŭ organikaj bazoj nomataj ptomainoj.
9. Casimir I. Davaine, franca bakteriologo, pruvis, ke la sango de l'animalo inflama, povas inflamigi dum la vivo kaj post la morto de animalo per bacilo de antrakso.
10. Gerhardt Henrik Armauer Hansen malkovris bacilon de Hansen, kiu kaŭzas infektan haŭtan malsanon nomatan lepro, karakterizitan jen per haŭtaj aŭ mukorajzaj nodetoj, jen per makula erupcio, jen per diversaj nervaj perturboj kun atrofio kaj gangreno.
11. F. I. Rosenbach el Germanujo, priskribis erizipelon, kontaĝan infektan malsanon, kaŭzitan de streptokoko.
12. Wilhelm Heinrich Erb, germana neŭrologo, priskribis simptomon de hiperaktireco al la galvana kurento ĉe malsanuloj je la tetanio-sindromo, karakterizita per kontrakturaj atakoj, trafantaj precipe la ekstremaĵojn de la membroj, kaj kaŭzata de perturbo en la kalcia metabolo, de misordo en la paratiroidaj glandoj aŭ de iuj infanaj infektaj malsanoj.

Sekvantaj jaroj alportos rivelojn, kiuj revolucios la medicinon.

Sac. Dr. Zbigniew Kucewicz, Pollando

landaj reprezentantoj

Aŭstralio

S-ro V.J. Timmins
73 Alexandria Parade
Hornsby N.S.W.

Aŭstrujo

S-ro W. Mudrak
Beatrixgasse 19/9
A-1030 Wien III - P.K. 105.713

Belgujo

S-ro Eugeen Paesmans
Lange Koepoortstraat 64
B 2000 Antwerpen, tel. 321751
P.K. 41 45 89

Brazilo

B.E.L. (Brazila Esper. Ligo)
Praça da Republica 54, 1e
Rio de Janeiro

Britujo

S-ro Norman W. Vigar
28 Franklands Drive, Weibridge
13000 Addlestone - Surrey (Anglujo)
KT 15 1 EG
tel. Weybridge (0932) 45743

Ĉeĥoslovakio

S-ro Aleš Berka
Na Harazi 1423
75501 Vsetín

Francujo

S-ro Gaston Veron
Place de la Petite Bruyère
F 61700 Domfront (Orne)
CCP Rouen 1188-63 Z

Germanujo

S-ro Gerhard Vogel
Tondernstr. 36
D 5 Köln 30 - P.K. Köln 166355

Hispanujo

S-ro Miguel Martinez
Av.da San José 105, Pral. 3a
Zaragoza

Irlando

S-ro O'Reilly P.J.
« Woodbine » Bluebell
Dublin 12

Italujo

D-ro C.C. Ferrari
Viale dei Mille, 37
I-20129 Milano - tel. 267895
P.K. 3-7791

Japanujo

S-ro Matubara Hatirô (Anselmo)
Namimatu-tyô, 4 ban, 5 gô
596 Kisiwada, Oosaka-hu

Jugoslavio

S-ro Ferenc Dongò
Javorska ul. 4
24413 Palić

Kanado

S-ino Pauline Proulx
790-80 E Rue Est
Charlesbourg, Québec

Kolombio

P. Louis E. Palacios Toral
Apartado Aéreo 12-03
Cartagena

Koreo

S-ro Paul Kiseng Kim
I. P. O. Box 2752
Seoul - South-Koreo

Madagaskaro

S-ro Ramanantsoa Claude
Dominique Gérard
Cité Ambohipo 469
Tananarive

Nederlando

S-ro S.P. Smits
Stadhoudersring 326
Zoetermeer
P.K. 68 51 24

Nov-Zelando

D-ro Hamway Johano
29 Arran str. Avondale
Auckland SW. 3

Polujo

Pola Katol. Unuiĝo Esper.
41800 Zabrze 1, skr pt. 68

Portugalujo

S-ro M. M. Lourenço Gouveio
Caixa Postal 456
Funchal-Madeira

Svislando

S-ro J. Lutz-Parolo
Himmelrichstr. 61
CH 6010 Kriens LU
P.K. 60-1739

Urugvajo

D-ro R. Zeballos Morales
Fray Marcos (Flor)

Usono

S-ro H. S. Corlett
7605 Winona Lane
Sebastopol, California 95472

espresso KATOLIKA

rajtigo de la tribunalo de milano n. 208
(27 majo 1971)

respondeca direktoro:

longoni ferdinando

via s. ambrogio 2 / tel. 9960050

I / 20051 limbiate (mi)

presejo: scuola grafica

istituto salesiano s. zeno

via minzoni 50

37100 verona

ekspedo per poŝtabono / gr. III/70